

LingvoHelpilo 2.0

Pedagogia literum- kaj gramatikkontrolo por Esperanto

Eckhard Bick

GrammarSoft ApS
Esperantic Studies Foundation



LA ESPERANTO ESTAS LA PLEJ FACILA
LINGVO DE LA TUTA MONDO- UWU



Esperanto - la plej facila lingvo ... aŭ ĉu?



... kaj neniuj estas imuna :)

Elektu de **estran**oj kaj anstataŭanto.

Ĉe la jarkunveno pasintan jarojn mi demandis al la ĉeestantoj ĉu ili preferas presitan aŭ elektronikan version de nia revuo EeD.

La ŝipvojaĝo daŭris pli longa ol atendite.

Lingvohelpilo ×

All errors / markings

Elektu de **estran**oj kaj anstataŭanto ...

Ĉe la jarkunveno **pasintan jarojn** mi demandis ...

...al la ĉeestantoj , ĉu ili ...

...ŝipvojaĝo daŭris pli **longa** ol atendite ...

Close

Facila Esperanto-gramatiko - eĉ pli facile!

Lingvohelpilo helpas al vi majstri la akuzativon kaj elekti la ĝustajn vortojn, afiksojn kaj finaĵojn.

[Lingvohelpilo](#)[Pri](#)[La Projekto](#)[Realigantoj](#)[Kunlaborebloj](#)[Pli da informoj](#)[Kontaktu nin](#)

Lingvohelpilo

Ortografia kaj gramatika kontrolilo kaj helpilo por Esperanto – facila, efika kaj agordebla!

Lingvohelpilo ne nur trovas tajperarojn kaj falsajn amikojn. Ĝi ankaŭ helpas al vi majstri la akuzativon kaj elekti la ĝustajn vortojn, afiksojn kaj finaĵojn.

Krome, *Lingvohelpilo* havas pedagogian aspekton. Malsame al aliaj kontroliloj, ĝi “komprenas” vian tekston, analizante la strukturon de vortoj kaj frazoj. Tiel ĝi povas rekoni, pri kiu speco de eraro temas, kaj doni pedagogiajn klarigojn kaj ekzemplojn por dekoj da malsamaj erartipoj.

Eblas uzi *Lingvohelpilon* rekte en reta interfaci, sed ankaŭ kun *Word*, *Google Docs* kaj *Outlook*. Ne gravas ĉu vi uzas teko- aŭ platkomputilon, kaj ĝi ankaŭ funkcias kun poŝtelefonoj.

Lingvohelpilo estas senkosta, ĉu kun aŭ sen ensaluto. Kun persona uzantokonto vi havas aliron al personaj agordoj kaj uzantovortaro. Vi povas ekz. ignori malcertajn erarojn aŭ elekti nur marki akuzativajn erarojn.

La nova eldono de *Lingvohelpilo* estas financata de [ESF](#) (Esperantic Studies Foundation) kaj realigata uzante [tekst-kontrolilan softvaron](#) de *GrammarSoft*.



Lingvohelpilo estas senkosta, ĉu kun aŭ sen ensaluto. Kun persona uzantokonto vi havas aliron al personaj agordoj kaj uzantovortaro.

Ensalutu kiel anonima uzanto

Ne malesperu:
Savos vin
Lingvohelpilo!

Ensalutu kiel anonima uzanto

Krei uzantkonton

Ensaluti

Ensaluti



DAN Dansk
DEU Deutsch
ENG English

Agordoj

Ensaluti



LINGVOHELPILO



✓ Kontrolli la tekston

✓ Ignoru flavajn markojn

↻ Malfari

Agordoj



Paragraph



B

I



Tekst-formatigo

... enmetu tekston ĉi tie ...

⊖ Rekomenci skribadon

Kopii tekston

✗ Forviŝi tekston



Google Docs



Microsoft Word



Microsoft Outlook



RetMig

Dana gramatikkontrolilo



Kommaforslag

Dana komokontrolilo



Commatizer

Angla komokontrolilo



Kommatroll

Germana komokontrolilo

Kio estas speciala pri *Lingvohelpilo*?

- ◆ *Lingvohelpilo* estas ambicia lingvokontrolilo por Esperanto, kun unikaj trajtoj kompare al aliaj iloj:
 - ĝi korektas ne nur misliterumitajn vortojn, sed ankaŭ **gramatikajn eraron en veraj vortoj**
 - ĝi rekonas novajn, **kunmetitajn vortojn**
 - ĝi uzas la **frazokuntekston por rangigi** eblajn korekto-proponojn
 - ĝi efektivigas plenan **morfosintaksan kaj semantikan analizon** de la teksto je frazonivelo
 - ĝi ĉerpas vortojn kaj **uzostatistikojn el grandaj tekstokolektoj** (korpusoj)
 - kaj plej grave, ĝi havas **pedagogian aspekton**, klasifikante kaj **klarigante erarojn**, tre utila trajto por lernantoj

Markado, korektado kaj klarigado de eraroj

“La milito komencis antau 3 jaroj kiam rusaj fortoj surprize lanĉis invado de Ukrainio.”

La milito **komencis** **antau** 3 jaroj, kiam rusaj **fortoj** **surprize** lanĉis **invado** de **Ukrajnio**.

- ✓ komenciĝis
- ✓ Redakti
- ✗ Ignori
- 👁 Vidu klarigon

Mankanta afikso: -iĝ

- ✓ komenciĝis
- ✓ Edit
- ✗ Ignore

Mankanta afikso: -iĝ

Aldonu la sufikxon -iĝ!

Oni uzas -iĝ por esprimi transiron al alia "esto-stato". 'A x-iĝas' signifas 'A ekestas x'. Tipe do temas pri adjektiva aŭ substantiva radiko:

- Li malsani*ĝis* = Li ekestis malsana.

- Li prezidanti*ĝis* = Li ekestis prezidanto.

Verboj kun -iĝ estas netransitivaj. Se oni uzas -iĝ kun transitiva radiko, la rezulto similas pasivon sen eksplacita aganto

... eĉ kun 23 eraroj en la sama frazo

“Mi pensas la lingvoj kiu ni usas nun kiel universalajn Lingvojn povas ŝangi sed, mi ne pensas ke Esperanto estos la universala lingvo anstataŭ Angla kaj Franca, ĉar la tuto mondo ne volas remplaci tiuj ĉi lingvoj kun Esperanton baldaŭtempe.”



Ensaluti



✓ Kontrolli la tekston

✓ Ignoru flavajn markojn

↻ Malfari

⚙ Agordoj



Mi pensas, ke la lingvoj, kiu ni usas nun kiel universalajn Lingvojn, povas ŝangi, sed, mi ne pensas, ke Esperanto estos la universala lingvo anstataŭ la Angla kaj Franca, ĉar la tuto mondo ne volas remplaci tiuj ĉi lingvoj kun Esperanton baldaŭtempe.

✓ tiujn ĉi

✓ Edit

✗ Ignore

Akuzativo en rekta objekto

Mankas akuzativa -n en rekta objekto. En Esperanto, sendepende de vortordo, oni distingas objekton de subjekto per la finaĵo -n. Kutime subjekto indikas

Projekthistorio kaj partneroj

◆ **Lingvohelpilo 1: 2007-2011**

- teamo kun lingvistikaj, pedagogiaj kaj programistaj specialistoj (6 personoj, kunlaboro kun lernu.net)
- servilgastigado ĉe SDU ĝis 2022, nun GrammarSoft ApS
- bontenita de Eckhard Bick & Tino Didriksen

◆ **VISL** (universitata projekto 1996-2022)

- lingvoteknologio & gramatikinstruado por 28 lingvoj
- instruiloj, CALL ludoj, gramatike etikedigitaj tekstaroj (CorpusEye)

◆ **GrammarSoft ApS & GramTrans** (komercaj, LH 1 & 2)

- gramatikaj analiziloj por 10 lingvoj, maŝintradukado (ekz. Wikitrans: la angla Vikipedio en Esperanto)
- tekstkorektiloj (Ordret, RetMig, Commatizer, Kommatroll)
- dinamikaj kaj rilatigaj vortaroj (ekz. DeepDict, FrameNet)

◆ **Esperantic Studies Foundation:** Financado de pri-, por- kaj per-esperantaj projektoj (LH 1 & 2)

Projektceloj kaj realigo de *Lingvohelpilo-2*

- ◆ La projekto celis (celas) krei pli profesinivelan korektilon
 - portis *Lingvohelpilon* al komercdevena tekstprilabora infrastrukturo, kun nova, adaptiva interfaco
 - integrigis *Lingvohelpilon* kun WORD, Google Docs kaj Outlook, por diversaj operaciaj sistemoj kaj komputiltipoj (platkomputiloj kaj poŝtelefonoj)
 - aktualigis la leksikan kaj gramatikan bazon de *Lingvohelpilo*, uzante novajn, ampleksajn kaj etikedigitajn tekstokolektojn, reflektante modernan lingvouzon
 - refaris kaj larĝigis la regulojn kaj la statistikan bazon de *Lingvohelpilo*, plibonigante la ĝeneralan funkcion kaj kovradon de eraroj, dume reduktante la riskon de falsaj erarmarkoj
- ◆ Realigo:
 - *GrammarSoft*, kiu disponigas sian ekzistantan komercan (danan) korektilo-softvaron (*RetMig*) kiel elirpunkton
 - *Esperantic Studies foundation* (financado)

Projektkalendaro

- ◆ **Januaro – marto 2024:** Kolektado de datumoj kaj korpusa laboro
- ◆ **January – junio 2024:** Programado por porti Lingvohelpilon al la softvara platformo de GrammarSoft (RetMig) kaj integriĝi kun ties infrastrukturo
- ◆ **Marto 2024 – majo 2024:** Ĉefa leksikografia fazo, fokuso pri literumkontrolado
- ◆ **Junio 2024 – decembro 2024:** Ĉefa gramatika fazo: Frazo-analizo, senambiguigo, eraromarkaj reguloj, veravortaj eraroj
- ◆ **Julio 2024 – decembro 2024:** Esperanto/Lingvohelpilo-specifaj adaptoj en la uzantinterfaco: JavaScript-programado, pedagogiaj tekstoj, realigo de interaktivaj funkcioj
- ◆ **Januaro – marto [majo] 2025:** Dua gramatika fazo: Korektado kaj aldono de sistemreguloj surbaze de la testrezultoj. Ŝanĝoj en la interfaco surbaze de uzantokomentoj.
- ◆ **Marto 2025:** Laborrenkontiĝo pri testado, uzantokomentoj kaj ĝenerala pritaksado
- ◆ [Marto-junio 2025: prezentado de Lingvohelpila erarkorpuso en scienca konferenco. Esplorado pri falsaj amikoj]
- ◆ **Postperiodo** (5 jaroj): servilservo, bontenado de softvaro, aktualigoj de sistemo kaj interfaco; diskonigo, prelegoj ktp.

Duopa celgrupo

◆ Esperanto-lernantoj:

- Ĉefe **plenkreskaj** L2-parolantoj, kun tre malsimilaj L1-fonoj: → granda vario de erartipoj, povas malsami al tiuj de gepatralingvaj kaj infanaj eraroj
- Distanclernado kaj memlernado estas kutimaj: → graveco de **pedagogia mentorado**, klarigoj kaj ligoj al lernolibraj tekstoj
- Kvalito kaj tujeco de kaj eraro-identigado kaj komentoj/klarigoj estas gravaj faktoroj en lingvo-lernado

◆ Bonaj Esperanto-parolantoj

- Diaspora lingvokomunumo, toleremo pri leksika kaj gramatika variado → neceso de robusta parsilo (lingvoanalizilo)
- Samaj bezonoj kiel en gepatra lingvo: Ampleksa kaj fidinda eraro-rekono, bona rangigo de korektopropoj
- Esperanto-specifa problemo: distingi inter misliterumitaj vortoj kaj kunmetitaj kaj afiksitaj vortoj

Dizajnp parametroj: Identigo de eraroj

- ◆ **Morfologia kaj sintaksa analizo** (etikedigilo, parsilo)
 - Uzado de **kunteksto por rangigi** korekto proponojn
 - **Veravortaj eraroj**: Rekoni gramatikajn erarojn en ĝuste literumitaj vortoj (ekz. akuzativo, transitiveco, aspekto)
 - Traktado de **fleksia agordo** (np-agordo, predikativoj)
- ◆ **Klasifikado de eraroj**, permesante pedagogiajn klarigojn
 - Specifi gramatikajn kaj aliajn erartipojn
 - Limigi falsajn avertojn, tra rekonado de ekster-vortaraj nomoj, mallongigoj kaj kunmetitaj vortoj
- ◆ **Empiria bazo**:
 - Kompilado kaj gramatika etikedigo de granda esperanta tekstaro, kun ampleka kovro de temoj kaj genroj
 - Oftecostatistikoj por vortoj kaj eraroj
 - Kolektado de uzantoeraroj

Ekzemplo por la graveco de morfologia analizo: Per-afiksa vortklasifikado

valenta aŭ semantika kategorio (vortokazoj / unikaj vortoj)	afikso	afiks- vortoj (okazoj)	% afiks- markitaj vortoj (okazoj)	afiks- vortoj (unikaj)	% affiks- markitaj vortoj (unikaj)
<vt> transitiveco (50,358 / 12,160)	-ig	4,659	9.3 %	1,856	15.3 %
<vi/ve> netransitiva (34,889 / 8,675)	-iĝ	4,252	12.2 %	1,495	17,2 %
<ve> ergativa (9,688 / 1,649)	-iĝ	1.584	16.4 %	825	50,0 %
<con> ujo (1,192 / 126)	-uj	66	5.5 %	27	21.4 %
<L...> <inst> loko (12,400 / 1,806)	-ej	1,614	13.0 %	344	19.0 %
<tool> ilo (713 / 179)	-il	345	48.4 %	99	55.3 %
<H> <Hprof> <Hfam> ... homa (19,503 / 3,017) (sen homaj grupoj <HH>)	-ul	1,673	8.6 %	522	17.3 %
	-in	1,311	6.7 %	237	7.9 %
	-id	27	0.1 %	8	0.3 %
	-ist	2,941	15.1 %	621	20.6 %
	-an	845	4.3 %	196	6.5 %
	-estr	294	1.5 %	55	1.8 %
	-nj, -ĉj	70 (62/8)	0.4 %	7 (3,4)	0.2 %
	ge-, bo-	79 (74/5)	0.4 %	0	0.0 %
	-ant, -int, -ont	3,158	16.2 %	719	23.8 %
	all human	10,398	53.3 %	2,365	78.4 %

procentaĵo pli alta por vorttipoj ol por vortokazoj, kongrue kun la produktivo de afiksado en Eo, kaj la relativa ofteco de la ne-afiksita centra leksiko

Dizajnp parametroj: Uzantointerfaco

◆ Grafika uzantointerfaco (GUI)

- markado de eraroj kun pedagogiaj komentoj
- laŭvica, interaga korektado de eraroj
- laŭebla reteno de formatigo kaj tekstaranĝo

◆ Agordoj-menuo: Adaptoj kaj optimigoj por individua uzo

- ŝalti aŭ malŝalti individuajn erartipojn, aŭ grupojn de erartipoj
 - por limigi falsajn avertojn (bonaj parolantoj)
 - por prioritati gravajn, aŭ individuajn erarojn (lernantoj)
- aldoni vortojn al uzantovortaro

◆ Subteni malsamajn **labormediojn**

- Windows/Mac, tekokomputiloj, platkomputiloj, telefonoj
- Integrigo kun tekstiloj: Word, Google Docs, Outlook
- Rezerva solvo: Retinterfaco, per tekstkopiado

Dizajnp parametroj: Kvalito

◆ Kovrado

- bona leksika kovrado (= grandaj vortaroj)
- trakti la plej multajn oftajn erartipojn (sed ne stilistikon), kun akceptebla trafsukceso
- trakti veravortajn erarojn
- trakti erarojn en kunmetitaj vortoj

◆ Precizeco

- limigi la kvanton de falsaj avertoj
- rekoni nove kreitajn vortojn, nomojn kaj mallongigojn, kaj ne marki ilin kiel (ekstervortarajn) erarojn

◆ Robusteco

- povi analizi tekston pli-malpli sendepende de ĝenro
- trakti nekompletajn frazojn kaj la lingvostilon de sociaj retoj

Esperanto-specifaj aspektoj

- ◆ Aglutina lingvo, do vortlistoj funkcias malpli bone:
 - Normalaj literumkontroloj ofte ne rekonas derivitajn aŭ kunmetitajn vortojn
 - Afikso-eraroj (aŭ konfliktoj inter afiksoj kaj kunteksto) bezonas specialan atenton
- ◆ La plej multaj Esperanto-parolantoj estas plenkreskaj L2 (aŭ L3 ...) parolantoj kun enorma vario de L1-lingvoj
 - graveco de la lernanto-celgrupo
 - interferenco-eraroj el multaj malsamaj lingvoj (denaska aŭ ĉefa/unua fremdlingvo) --> granda diverseco, bezono de robusta sistemo kaj individua mentorado
 - pozitivaflanke: alta toleremo (lingva akcepteblo) por sintaksa variado, sinonimoj ka metaforoj

Interfaco: Reto

LINGVOHELPILO 

Log out



✓ Check the text

✓ Skip all yellows

↺ Undo

⚙ Options



Mi manĝas **glaciaĵo**.

✓ glaciaĵon

✓ Edit

✗ Ignore

👁 See explanation

Akuzativo en rekta objekto



✓ Check the text

Mi manĝas **glaciaĵo**.

✓ glaciaĵon

✓ Edit

✗ Ignore

Akuzativo en rekta objekto

Mankas akuzativa -n en rekta objekto. En Esperanto, sendepende de vortordo, oni distingas objekton de subjekto per la finaĵo -n. Kutime subjekto indikas aganton aŭ kaŭzantan eventon, dum objekto indikas dependan rolon, ekz. viktimon, celon, rezulton aŭ vehiklon de ago aŭ okazaĵo. En frazo 'A-o xxxas B-on', vi povas fari teston demandante: *Ĉu estas A-o aŭ B-o, kiu xxxas?* La respondo estas la subjekto (A-o). La objekto (B-o) ne xxxas, sed estas xxxata.



✓ Check the text

Mi manĝas **glaciaĵo**.

✓ glaciaĵon

✓ Edit

✗ Ignore

ago aŭ okazaĵo. En frazo 'A-o xxxas B-on', vi povas fari teston demandante: *Ĉu estas A-o aŭ B-o, kiu xxxas?* La respondo estas la subjekto (A-o). La objekto (B-o) ne xxxas, sed estas xxxata.


Legu pli en la Lernul-paĝo pri [akuzativo](#) (Objekto).

*Li manĝis **pomo** [pomon]*

*Du **jaroj** [jarojn] antaŭ la milito*

*Ŝi preferas la francan kiel **dua lingvo** [kiel duan lingvon]*

Interfaco: Word



Mi parolis kun prezidanto de Usono. Okazis la neĝoŝtormo.




La ŝtrumpoj estas en la plej suba tirkesto.
En la nuna periodo ...
Parolis la reĝo de Bestolando.

[Hide ▲](#)

[Report this error marking](#)

[Start over](#) [Support](#)
[Language](#) [Options](#)
[Log out](#) [About](#)



Lingvohelpilo ✕

[< Previous](#) [See all](#) [Next >](#)

[✓ Insert](#) [🔄 Ignore](#) [✎ Manual](#)

Your text [Show analysis](#) ☐

Mi parolis kun **la** prezidanto de la Usono .

Mankanta artikolo

Ĉi tie devus esti difina artikolo.

Oni uzas artikolon por ĝenerale konata, videbla, divenebla, unika aŭ antaŭe menciita afero, aŭ ĝenerale kiam oni supozas, ke la aŭskultanto scias pri kio aŭ pri kiu(j) temas. Ne uzu difinan artikolon antaŭ nomo aŭ antaŭ alia difinilo (*tiu, ĉiu, kies, ambaŭ, unu, mia, via ktp.*). Eblas uzi 'la' anstataŭ posesiva pronomo (*li levis la manon*) aŭ ĝeneralig anstataŭ 'ĉiuj' (*la spektantoj aplaŭdis*). Oni krome uzas 'la' por krei lingvonomon el nacia aŭ etna adjektivo (*la angla, la japana*).

Interfaco: Google Docs

Lingvohelpilo regtest all ☆ 📁 ☁

File Edit View Insert Format Tools Extensions Help

🔍 ↶ ↷ 🖨️ ↵ 🗨️ 100% ▾ Normal text ▾ Arial ▾ - 18 + ⋮ ✎ ▾ ^

1 1 2 3 4 5 6

☰

Mi opinias ankaŭ, ke lumo estas **bonaj** por la psiko.

En Esperanto, la plurala finaĵo estas '-j'. Legu pli en la Lernu!-paĝo pri [singularo kaj pluralo](#).

Li estas **junaj** [li estas juna]

Ĉiu el ili estis **kontentaj** [kontenta]

La polico estis **armitaj** [armita]

Hide ▲

📧 Report this error marking

🔄 Start over ? Support

🌐 Language ⚙️ Options

🚪 Log out ⓘ About

Lingvohelpilo

< Previous See all Next >

✓ Replace ⚡ Ignore ✎ Edit

Your text [Show analysis](#) ☐

Mi opinias ankaŭ , ke lumo estas **bonaj** por la psiko .

Replace with ...

bona 📖

Singularo

Vi uzis pluralon anstataŭ singularo, forigu la finaĵon '-j'.

Lingvohelpilo trovis konflikton kun alia, interdependa vorto, kiu indikas singularon. Notu ke interdependaj substantivecaj kaj adjektivecaj vortoj (a-vortoj, numeraloj, determinaj pronomoj) devas agordi en nombro, do ne eblas diri '*granda domoj*', devas esti aŭ '*granda domo*' aŭ '*grandaj domoj*'. Se vi ne volas ŝanĝi la markitan singularan vorton, konsideru evantuale fari la inversan ŝanĝon (al singularo) en interdependa vorto.

Klasifiko de eraroj: Literumo & Vortaro

- ◆ ~15 pure **ortografiaj** erartipoj (ruĝaj markoj):
 - literumo, OCR, artefakto, h-stilo, au (aŭ), mallongigo-eraro
 - ± streketo (**ĉi-tie**), afikso-streketo, ± apostrofo, ± majusklo,
 - vortkunfando (**ĉitiu**), vortdisigo (**plej parto, aĝo limo**)
- ◆ ~10 specoj de (rekonitaj) **ekster-vortaraj vortoj** (flavaj)
 - nova & bona* kunmetaĵo (**urbomuzikisto, varmbanejo**)
 - teorie ebla, sed malverŝajna kunmetaĵo (**patro|preni, ino|cento**)
 - mankanta ligovokalo (**aglplumo**), nomo* (**Tim Walz**), mallongigo* (**k.a.**), nova vorto (**leusa**), neologismo, arkaismo, fremdvorto (**fracking**)
 - kontrolinda vorto (ne rekonita, sed neniu simila vorto trovita)

~70 gramatikaj eraroj (bluaj markoj)

◆ -n eraroj

- akuzativo: objekta, direkta, kvanta, tempa, kompara, atributa, transitiva, objektpredikativa, apostrofa, troa (=nominativo), hispanismo: a+
- singularo/pluralo: adjektivo & substantivo, subjekta kaj objekta predikativoj, semantika (multe da kato)

◆ verboj

- finitivo/infinitivo/participo, as/os/us/u
- aktiva/pasiva, ata/ita, anta/inta

◆ vortklaso:

- ĉefaj: adverbo/adjektivo, substantivo
- aliaj: ordonombro, posesivo, ±refleksivo, -iu, -io, ki-

◆ afiksoj: ±ig/iĝ, ul/ulino, an, ist, ado, ⁀ec

◆ artikolo (difiniteco): ±la

Vortelekto: ~ 650 eraro-klasoj, ~2000 vortoj

- ◆ ambigueco (13), ekz. *vazo --> angio*
- ◆ arkaismo (3), ekz. *revidi --> revizii*
- ◆ evitinda neologismo (2), ekz. *implementi --> realigi*
- ◆ fakvorto (7), *potenciala --> ebla, enŝuti/deŝuti --> alŝuti/elŝuti*
- ◆ falsa amiko & konfuzebaj vortoj (68), *rajti, pravi, ĝusti*
- ◆ falsa amiko & transitiveco (3): *recikli --> recikligi*
- ◆ falsa amiko (356): *virusa --> furora*
- ◆ konfuzebaj vortoj (235): *venki – gajni*, landonomo-etnonomo
- ◆ malĝusta konjunkcio aŭ prepozicio (7): *post ol, de <--> da*
- ◆ malĝusta vortelekto (27): *pli – plu, personeco --> figuro*
- ◆ mankanta/troa afikso (20+2): *bedaŭre --> bedaŭrinde*
- ◆ neologismoj (11): *futuro – estonteco*
- ◆ transitiveco/valento (27+3): *manki ion, ŝanĝi - ŝanĝiĝi*

Frazfluo – interpunkcio kaj vortordo

◆ ~ 12 interpunkciaj eraroj

- troa aŭ mankanta komo, ekz. antaŭ/post subpropozicio, kunordiga komo, refren-demanda komo, apozicio ktp.
- frazofino, titolofino, duobla punkto, demandosigno

◆ ~ 7 vortĉenaj eraroj:


- troa aŭ mankanta vorto (ekz. artikolo), vortordo
*en **la preskaŭ** tuta mondo [en preskaŭ la tuta mondo]*
- nul-subjekto, formala subjekto (ĝi)
*La idealo de EU estas samrajtaj lingvoj, sed en la realo **ĝi** ne estas tiel.*
- fraznodo, sintaksa kolizio (averto)
*Tiu laboro **mi pensas, ke** estas malfacila.*
- Interdependaj eraroj (aŭ-aŭ-eraroj, XOR-eraroj):
*En la golfo estis **armea ŝipoj**. [arme**a**j ŝip**o**j / armea ŝip**o**]*

La metodo: 3 niveloj de eraro-rekonado

- **1. Ne-vortoj** similaj al ekzistanta vorto xxx
 - Rekonitaj antaŭ gramatika analizo, uzante vortlistojn kaj vortkomparojn, plus filtrilojn por eraraj vortpartoj
 - Ricevas <R:...> korektojn kaj <W:[0-9]+> elekto-rangojn laŭ Levenshtein-distanco kaj klavara/litera/fonetika simileco, plus vortofteco
 - ekz. *espernatisto* → *esperantisto*
- **2. Sistema rekono de ortografiaj problemoj**
 - x, h, ocr, apostrofoj, streketoj, vortodisigo, vortkunfandoj
 - *kor* --> *kor'*, *pied pilko* --> *piedpilko*, *farnilio* --> *familio*
- **3. Regulo-bazita eraro-markado (CG)**
 - aldono de @-markoj por gramatikaj eraroklasoj kaj vortanstataŭigoj (ekz. falsaj amikoj)
 - morfologia generilo produktas la finan korektoproponon
 - ekz. *la filmo komencis* --> @igx --> komenciĝi --> (V IMPF)
la filmo komenciĝis

Lingvohelpilo programĉeno

- korektilo kun **parsilo** (gramatika analizilo)
- uzas **kuntekston** por rangigi korektproponojn
- trovas gramatikajn eraroj uzante **sintaksajn ligojn** kaj **semantikajn klasojn**
- markas **vortkonfuzojn** kaj **falsajn amikojn** uzante kuntekston
- 3800 EspGram reguloj (parsilo)
- 3200 eraro-markaj reguloj (Lingvohelpilo mem)
- 162.000 vortoj kun gramatikaj kaj/aŭ semantikaj informoj (sen nombri fleksiitajn formojn)



Uzanto-interfaco: Markado kaj korektado

LINGVOHELPILO

Ensaluti

✓ Kontroli la tekston

✓ Ignoru flavajn markojn

↻ Malfari

⚙ Agordoj

Menuo

Necesa

implementi

la novajn regulojn.

✓ Necesas

✓ Redakti

✗ Ignori

👁 Vidu klarigon

Finitivo

Nuntempo (as-tempo, prezenco)

Malgrava aŭ necerta eraro en vorto kiu ekzistas

kiel tia

lemolibro

portis

okcidentajn

vestaĵojn

kaj

komeneis

simple

paroli

zivas

ciferecaj

signumoj

.

agadon unu el la aktivaj Fakaj Asocioj de UEA, kies lastatempa agado forte

co.

Aleksandro la 1-a Karaĝejeviĉ, la reĝo de serboj, kroatoj kaj slovenoj, en junio 1922 edzinigis

la

rumana

princinon

Marija.

Pedagogio: eraro-koloroj

- **Ruĝaj eraroj:**
 - Literumeraroj: certa eraro kun korekto propono
 - Semantikaj eraroj: Malĝusta vortelektio / falsa amiko
 - *artikolo* (verko aŭ vortklaso) – *artiklo* (varo)
- **Bluaj eraroj:** Gramatikaj eraroj en veraj vortoj
 - *La domoj estas **alta**.*
- **Verdaj eraroj:** Malgravaj/malcertaj eraroj, evitindaĵoj
 - *La **aktuala** [nuna] Japanio*
- **Flavaj markoj:**
 - Vorto ne en vortaro, sed rekonita (normale ne markita):
 - kunmetaĵo, nomo, mallongigo aŭ fremdvorto
 - *La firmao uzas **fracking** Ili estas **inocentoj***
- **Violkoloraj eraroj:** Interpunkcio (ĉefe komoj)

Pedagogio: Plurnivelaj klarigoj

Marko

Your text

Show analysis ☐

Aldone al ĉifrado , publik-ŝlosila ĉifriko
inkluzivas **ciferecaj signumoj** .

Korekto

Replace with ...

ciferecajn subskribojn



Kategorio
& difino

1

Akuzativo en rekta objekto

Mankas akuzativa -n en rekta objekto. En Esperanto, sendepende de vortordo, oni distingas objekton de subjekto per la finaĵo -n. Kutime subjekto indikas aganton aŭ

Legu pli en la Lernu!-paĝo pri **akuzativo** (Objekto).

Li manĝis **pomo** [pomon]

Du **jaroj** [jarojn] antaŭ la milito

Ŝi preferas la francan kiel **dua lingvo** [kiel duan lingvon]

2

Malĝusta vortelektio

En Esperanto, '**signumo**' estas la +/- signo antaŭ nombro. Ĝi ne havas la sencon de subskribo, ankaŭ ne en kunteksto de cifereca subskribo.

Post **signumo** (subskribo) de la traktato la du landoj malfermis ambasadejojn.




Manatee interface (fast, most up-to-date)



PIV 2020

Ek

(a) de eraro al eraro




aŭ (b) elekti
kion korekti




All errors / markings

Close

- Necesa **implementi** la novajn ...
- Akvopartio **cl** Francio kaj ...
- ...cl Francio kaj **rniaj** fratoj kun ...
- ...fratoj kun la **lemolibro** portis okcidentajn ...
- ...la lemolibro portis **okcidentajn** vestaĵojn kaj ...
- ...lemolibro portis okcidentajn **vestaĵojn** kaj komeneis ...
- ...okcidentajn vestaĵojn kaj **komeneis** simple paroli ...
- ...vestaĵojn kaj komeneis **simple** paroli pri ...
- ...simple paroli pri **m alnova** demo kratio .



Sistemarkitekturo, nivelo 1: literumkontrolado kaj leksikaj etikedoj



Sistemarkitekturo, nivelo 2: kunteksta disambiguigo & gramatikkontrolado

ŝi [ŝi] <fem> PERS 3S F NOM &SUBJ> #1->2 *She*
 anoncis [anonci] <vq> <fn:declare> <mv> V IMPF VFIN &FS-STA #2->0 *declared*
 , [,] PU #3->2
 ke [ke] KS &SUB #4->6 *that*
 ŝi [ŝi] <fem> PERS 3S F NOM &SUBJ> #5->7 *she*
 estis [esti] <aux> <cjt-first> V IMPF VFIN &FS-<ACC #6->2 *was*
 perfortigita [devigi] <**R:devigita**> <fn:be_attribute> <Q-> <fn:hurt>
 <PRP:per+fort%ig|i> <mv> V PCP PAS IMPF ADJ S NOM &ICL-AUX<
 <**@:BASE-devigi**> #7->6 *forced*
 rezigni [rezigni] <fn:refrain> <Q-> <mv> V INF &ICL-<SA #8->7 *to resign*
 kaj [kaj] <clb> KC &CO #9->6 *and*
 translokis [transloki] <**R:translokiĝis**> <cjt> <PRP:trans+lok|i> <fn:transfer>
 <mv> V IMPF VFIN &FS-STA <**@iĝ**> #10->2 *moved*
 al [al] PRP &<OA #11->10 *to*
 Romo [Romo] <Ltown> PROP S NOM &P< #12->11 *Rome*
 , [,] PU #13->12

kie [kie] <rel><aloc> ADV &ADVL> #14->21 *where*
 la [la] ART @insert #15->15 *the*
 tiama [tiama] <jtime> ADJ S NOM &>N #16->17 *then pope Gregory the 16th*
 papo [papo] <Hprof> N S NOM &SUBJ> #17->21
 Gregorio [Gregorio] PROP S NOM &N< #18->17
 la [la] ART &>N #19->20
 16-a [16-a] <num-ord> ADJ S NOM &N< #20->18
 konfirmis [konfirmi] <vq> <fn:confirm> <R:konfirmis> <W:2124> <mv> V IMPF
 VFIN &FS-N< #21->12 *confirmed*
 ŝian [ŝia] <fem> <poss> DET S ACC &>N #22->24 *her*
 morganata [morganata] <R:morganatan> ADJ S ACC &>N @acc #23->24
morganatic
 geedzeco [geedzeco] <R:geedzecon> <F:ge%edz%ec|o> <f-soc> N S ACC
 &<ACC @acc #24->21
 . [.] PU #25->2 *marriage*

Luksaĵoj: Sintaksa analizo

Akvopartio el Francio kaj miaj fratoj kun la lemolibro portis okcidentajn vestaĵojn kaj komenceis simplajn parolojn pri nova demokratio.

Aldone al cifrado, publikigita cifro inkluzivas ciferecajn signojn.

Aldone ni aŭdos pri SUS-40 kaj prezentos sian agadon unu el la aktivaj Fakaj Asocioj de UEA, kies lastatempa agado forte rilatas al la ĉi-jara kongreskontinento: Afriko.

Aleksandro la 1-a Kardjodjeviĉ, la reĝo de serboj, kroatoj kaj slovenoj, en junio 1922 edzinigis rumana princon Marija.

Al homoj de la Nordo, soifaj de varmaj sentoj, la bunta naturo sub varma suno kaj etoso de la itala siesto estis ĉiam loge ravita.

Lingvohelpilo

< Previous

See all

Next >

✓ Replace

⌂ Ignore

✎ Edit

Show analysis ☒

Your text

Aldone al ĉifrado, publikigita ĉifro
inkluzivas ciferecaj signoj.

Choose tags

■ Verb

■ Noun

■ Proper noun

■ Adjective

■ Adverb

■ Pronoun

■ Article

× Subject

● Predicate

▲ Direct object

■ Indirect object

▼ Adverbial

⊗ Subject-predicative

⊕ Object-predicative

Luksaĵoj: Korpusaj ekzemploj



[Help - CorpusEye Manual \(pdf\)](#) - [Use cases \(Powerpoint\)](#) - [Taglist \(cross-language\)](#) - [Development tag](#)

Frequency ↓

Sort

Freq

Rel G

Rel C

Rel S

Field

Wordform / surf: ▼

☐ Dependency head field

By

Left context
Right context
Left edge
Right edge

Offset

0

Absolute cutoff

0

☐ Collapse case

☐ Collapse diacritics

☐ Distinguish part-of-speech

☐ Lump results

N-grams

N-grams

« 1 2 3 4 5 6 7 8 9 10 ▼ 45 »

Show search Q

Show

epo_crawl

1 to 50 of 1859

Export all

egaleco , paco kaj amikeco , pri kiuj ni nepre parolu por **realigi** la harmonian vi
multege da helpoj de aliaj homoj kaj asocioj ni ricevis por **realigi** niajn rolojn en
tre sxatis pacon en la hejmo , kaj sekve , kiam li decidis **realigi** sian deziron pr
Kiel nericxa knabo povus **realigi** la projekton fo
Tio helpus por **realigi** la ...
Kaj **realigi** je la agxo de 2
« Ankaux por miaj gepatroj - kaj sekve por mi - **realigi** vian ideon grav
Nun acxetebblas fruktosukoj , kiuj provas **realigi** tiun ideon , se
siajn rilatojn kun Universala_Esperanto-Asocio por efike **realigi** siajn celojn .
- Volonte kaj tre facile ni povos **realigi** vian deziron .
veturis al siberia urbo Irkutsk (eo : Irkucko) por **realigi** sian revon .
, konciza strategio kaj cxu ni kunigas la fortojn por gxin **realigi** .
de mi mem kaj ke miaj bonaj notoj tute ne helpas min por **realigi** miajn elkorajn revojn !
al la diversaj auxdvidaj projektoj de TEJO , kaj mem **realigi** viajn kreemajn ideojn .
La partoprenantoj starigis simplajn golajxojn kaj decidis **realigi** ilin unue en siaj vilagxoj .
pri la enhavoj kaj pretigado de Kontakto , kun la oportuno **realigi** vian propran vizion por la revuo .
niaj diversaj kanaloj , profesie informi pri nia agado kaj **realigi** viajn kreemajn ideojn por ...

Previous See all Next

Replace Ignore Edit

Your text

Show analysis ☐

Necesa **implementi** la novajn regulojn .

Replace with ...

realigi



Evitinda neologismo

Ne ekzistas kognato (parencvorto) de la angla 'implementi' en Esperanto. Uzu 'realigi'.

Luksaĵoj: Vortaroligo

< Previous See all Next >

✓ Replace ✎ Ignore ✎ Edit

Your text Show analysis ☐

Necesa implementi la novajn regulojn .

Replace with ...

Necesas 

Finitivo

PIV 2020

✓ Serĉi Foliumi ☐ tildoj ✓ apartigi

Necesas

✓ kapvortoj ✓ derivaĵoj ☐ cetere

1 trafo en 1 artikolo

necesas

neceso

1 Absoluta bezono: *senti la neceson silenti; n*

2 Necesece: *ni baldaŭ trovos nin antaŭ la ne*
neceso, ke ni ĉiuj interkonsentu, estas kla

necesi. Esti necesa.

necesas. Estas necese.

Ĝeneralaĵoj

Eraro-kategorioj

Ĝeneralaĵoj

Uzanto-vortaro

Erartipoj

☐ Ne marku nekonatajn vortojn sen korekto propono

☒ Ne marku nekonatajn nomvortojn

☒ Ne marku nekonatajn kunmetaĵojn

☒ Ne marku nekonatajn mallongigojn

☐ Ne marku aliajn nekonatajn vortojn (fremdvortojn)

☒ Ne korektu usklecon

☐ Ignoru gramatikajn erarojn

☐ Ignoru kunmetaĵojn

☐ Ignoru apostrof-erarojn

☐ Ignoru ligstreko-erarojn

☐ Ignoru erarojn pri verb-finiteco

☐ Ignoru "la"-eraron (artikolon)

☐ Ignoru interpunkcion (komojn)

☐ Ignoru vortelektajn erarojn

Aspektigo

☐ Reliefigi korektojn (por kolorblinduloj kaj vidhandikapuloj)

Fermi

Agordoj

- * nur vidi gravajn/certajn erarojn
- * ne vidi nekonatajn vortoj kiun verŝajne estas tute bonaj
- * eviti false pozitivajn markojn

Agordoj:

ŝalti kaj malŝalti
650 (!) malsamajn
eraro-kategoriojn

Disigo-eraro: Tiu vorto devus esti kunsribita kun la antaŭa (ruĝa)	☐	☒	☐
Disigo-eraro: Tiuj vortoj devas esti kunsribitaj (ruĝa)	☐	☒	☐
Disigo-eraro: Tiuj vortoj devas esti kunsribitaj (ruĝa)	☐	☒	☐
Nova vorto: La vorto ne estas en la vortaro, kaj ne certa kunmetaĵo aŭ derivaĵo, sed ĝi verŝajne ekzistas (flava)	☐	☐	☒
Nespecifita literumeraro (ruĝa)	☐	☒	☐
Malgrava aŭ necerta eraro en vorto kiu ekzistas kiel tia (verda)	☐	☒	☐
Nekonata nomo (flava)	☐	☐	☒
Fremdvorto (flava)	☐	☒	☐
Mallongigo (flava)	☐	☐	☒
Mallongigo-eraro (ruĝa)	☐	☒	☐
Forigenda streketo inter vortoj (ruĝa)	☐	☒	☐
Forigenda streketo ene de vorto (ruĝa)	☐	☒	☐
Superflua streketo ene de vorto (ruĝa)	☐	☒	☐
Mankanta streketo post memstara prefikso, en kunordigo (ruĝa)	☐	☒	☐
Mankanta streketo antaŭ memstara sufikso, en kunordigo (ruĝa)	☐	☒	☐
Mankanta apostrofo (ruĝa)	☐	☒	☐
Troa apostrofo (ruĝa)	☐	☒	☐
Mankanta majuskligo (ruĝa)	☐	☐	☒
Nenecesa majuskligo (ruĝa)	☐	☐	☒
Mankanta demandosigno (markita ĉe la verbo) (gramatiko)	☐	☒	☐
Pluralo (gramatiko)	☐	☒	☐
Plurala signifo (gramatiko)	☐	☒	☐
Interdependa singularo/pluralo (ruĝa)	☐	☒	☐
Singularo (gramatiko)	☐	☒	☐

Perspektivo: duon-aŭtomata tekstkontrolo

Por lernantoj:

- ◆ Pli rapidaj reagoj
- ◆ Pli kompletaj klarigoj
- ◆ Normita, klara kaj interaga formato
- ◆ Personaj erarstatistikoj
- ◆ Individue adaptitaj proponoj

Por tutoroj:

- ◆ Malpli da laboro (kondiĉe de sufiĉa kvalito de la ilo)
- ◆ Pli facila markado de lernantotaskoj
- ◆ Grupaj kaj individuaj erarstatistikoj --> pli bonaj superrigardo kaj pritaksado

Por aŭtoroj de kontroliloj

- ◆ Aŭtentika testmaterialo kaj statistikoj
- ◆ Ebleco pritaksi la efikon de sistemŝanĝoj

La teamo

- ◆ Dr. phil. **Eckhard Bick** estas komputillingvisto kun gradoj en kaj medicino kaj lingvoj. De 1996 ĝis 2023 li estis esploristo ĉe Suddana Universitato. En 2000 li kunfondis GrammarSoft ApS, etan lingvoteknologian firmaon, kiu ofertas gramatikan etikedigon de tekstoj kaj diversajn ilojn kun rilato al tiu tasko. Eckhard Bick verkis komputilgramatikojn kaj vortarojn por la plej multaj latinidaj kaj ĝermanaj lingvoj kaj estas eksperto en la kampo de *Constraint Grammar* (Kunteksta Gramatiko). He publikigis multajn esplorojn pri komputil- kaj korpuslingvistiko, kaj pri aŭtomata lingvoanalizo. Liaj aktualaj esplortemoj inkludas semantikan etikedigon, sociajn retojn, maŝintradukon kaj aŭtomatan tekstkontroladon. Eckhard Bick havan longan historion kun Esperanto, kaj socie kaj kiel instruisto kaj esploristo. Interalie, li verkis instrumaterialojn (*Tesi la testudo*) kaj vortarojn (ekz. *Esperanto-Dana Vortaro*), sed ankaŭ originalan kaj tradiukitan beletron. Li partoprenis en multaj Esperanto-projektoj, inter ili *Lingvohelpilo* kaj du EU-financitaj Esperanto-projektoj, *Lingvo.info* kaj *Multilingualism Accelerator*.
- ◆ **Tino Didriksen** estas sendependa programisto kaj softvaro-konsultisto sperta pri C, C++, Java, Perl, PHP, JavaScript, HTML kaj XML, kombine kun servilo-prizorgo en Linux-medio. Li laboris kun Eckhard Bick kaj en la VISL-projekto de Suddana Universitato (ekde 2004) kaj kadre de GrammarSoft (ekde 2007), kie li okupiĝis pri varia gamo de taskoj, i.a. koncernante la tekstokontrolilojn de GrammarSoft kaj pluraj Esperanto-projektoj, inkl. de la origina *Lingvohelpilo*. Li ankaŭ laboras por la Gronlanda lingvosekretariato kaj *Learn Greenlandic*, kaj prizorgas propran retbabilejon, *JJ chats*.

Kiel ekuzi?

Lingvohelpilo.visl.dk  (eo, en, da)

Ensalutu kiel anonima uzanto

Krei uzantkonton Ensaluti

GrammarSoft Login

Register For This Site

Username

Email

Registration confirmation will be emailed to you.

Register

GrammarSoft Login

Username or Email Address

Password

☐ Remember Me

Register | Lost your password?

LINGVOHELPILO 

Elsaluti 

✓ Kontroli la tekston ✓ Ignoru flavajn markojn ↺ Malfari ⚙ Agordoj ☰ Menuo

... enmetu tekston ĉi tie ...




**Retumila
interfaco**

Metodo 1: Per AppSource







Metodo 2: Per Word

<https://appsource.microsoft.com>



<https://word.cloud.microsoft>





Sign in

Use your Google Account

Email or phone



[Forgot email?](#)

Not your computer? Use a Private Window to sign in. [Learn more about using Guest mode](#)



[Create account](#) [Next](#)



<https://docs.google.com>



Se vi havas 2 Google-kontojn, uzu la saman por kaj Docs kaj Chrome/Marketplace




Metodo 1: Per AppSource



Metodo 2: Per Outlook

<https://appsource.microsoft.com>



Sign in to Microsoft AppSource

Enter the email address of the account you want to use when accessing AppSource.

If possible, use your work or school account. If you log in with a Microsoft account, your work or school account will not be available.

Work, school or Microsoft account

someone@example.com

Sign in



Confirm your details to continue

 **Lingvohelpilo**
By GrammarSoft ApS

Get it now

You're signed in as Eckhard Bick (eckhard.bick@mail.dk).

<https://outlook.live.com>



Bibliografio - 1

- ◆ Bick, Eckhard (2006). A Constraint Grammar-based spellchecker for Danish with a special focus on dyslectics
- ◆ Bick, Eckhard (2007), Tagging and Parsing an Artificial Language: An Annotated Web-Corpus of Esperanto, In: Proceedings of Corpus Linguistics 2007, Birmingham, UK. Electronically published at (<http://ucrel.lancs.ac.uk/publications/CL2007/>, Nov. 2007)
- ◆ Bick, Eckhard (2009). A Dependency Constraint Grammar for Esperanto. Constraint Grammar Workshop at NODALIDA 2009, Odense. NEALT Proceedings Series, Vol 8, pp.8-12. Tartu: Tartu University Library.
- ◆ Bick, Eckhard (2011), WikiTrans: La angla Vikipedio en Esperanto In: Modernaj teknologioj por Esperanto (Proceedings of KAEST 2010, Modra, Slovakia). pp. 28-41. Espero/E@I, Partizánske.
- ◆ Bick, Eckhard (2015). DanProof: Pedagogical Spell and Grammar Checking for Danish. In: Galia Angelova, Kalina Bontcheva & Ruslan Mitkov: Proceedings of RANLP 2015 (Hissar, Bulgaria, 7-9 Sept. 2015). pp. 55-62.
- ◆ Bick, Eckhard & Tino Didriksen (2015). CG-3 - Beyond Classical Constraint Grammar. In: Beáta Megyesi: Proceedings of NODALIDA 2015, May 11-13, 2015, Vilnius, Lithuania. pp. 31-39. Linköping: LiU Electronic Press.

Bibliografio - 2

- ◆ Bick, Eckhard (2015). La kunteksta vortaro DeepDict: Korpusa leksikografio en Esperanto. In: Christer Kiselman & José Vergara (eds.): De esperanta korpuso ĝis islanda lingvopolitiko - Aktoj de la 36-a Esperantologia Konferenco en la 98-a Universala Kongreso de Esperanto, Rejkjaviko 2013. pp. 7-17. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- ◆ Bick, Eckhard (2016). A Morphological Lexicon of Esperanto with Morpheme Frequencies, In: Calzolari, Nicoletta et al. (eds.), Proceedings of LREC2016 (Portorož, May 23-28, 2016). pp. 1075-1078.
- ◆ Bick, Eckhard (2018). Arbobanko - A Treebank for Esperanto. In: Proceedings of CICLing 2018 - 19th International Conference on Computational Linguistics (Hanoi, March 2018), forthcoming (preprint, LNCS - Lecture Notes in Computer Science, Springer)
- ◆ Bick, Eckhard (2019). Automatic Generation and Semantic Grading of Esperanto Sentences in a Teaching Context. In: Alfter, David et al. (eds.) Proceedings of the 8th Workshop on NLP for Computer-Assisted Language Learning (NLP2CALL at NoDaLiDa, Sept. 2019, Turku, Finland). NEALT Proceedings Series Vol. 39 & ACL Anthology W19-6302, pp. 10-19. LiU Electronic Press & ACL.
- ◆ Bick, Eckhard (2020). Syntax and Semantics in a Treebank for Esperanto. In: Calzolari, Nicoletta et al. (eds.), Proceedings of the 12th International Conference on Language Resources and Evaluation, LREC2020 (Marseille, May 2020). pp. 5122-5129. ACL / ELRA
- ◆ Bick, Eckhard (2025). An Annotated Error Corpus for Esperanto. In: Proceedings of the 9th Workshop on Constraint Grammar and Finite State NLP: Rule-based and hybrid methods and tools for user communities. Trosterud, T., Wiechetek, L. & Pirinen, F. (red.). Tartu: University of Tartu Library, s. 1-8

<http://edu.visl.dk/lingvohelpilo/>
(Lingvohelpilo-1)

**[https://edu.visl.dk/
visl/eo/parsing/automatic/parse.php](https://edu.visl.dk/visl/eo/parsing/automatic/parse.php)**
(EspGram)

<http://esperantic.org>
(Esperantic Studies Foundation)

Gramatikaj eraroj: distribuo

Kun mallarĝa difino, sen nombri enmetojn, forigojn aŭ anstataŭigon de vortoj:

- ~35 gramatikaj erartipoj
- POS, afiksoj, fleksiaj eraroj
- 22% da eraroj en erarkorpuso
- El tiuj:
 - **45.7%** -n (akuzativo)
 - 12.7% pluralo/sing.
 - 10.2% transitiveco
 - 9.4% verba fleksio
- Erare aldoni troan morfemon estas pli kutime ol forlasi ĝin

Maloftaj kategorioj povas esti tro-reprezentitaj pro kovro-kialoj, sed “kromkaptaj” helpas iom ekvilibrigi la statistikon.

Tag	Error	%
acc	accusative -n: object	31.6
acc-dir, <u>acc-oc</u> , -quant, -trans	accusative -n: other complements	14.1
nom, <u>nom-oc</u> , <u>-pcp</u> , -prp	nominative: all uses	15.6
refl, no-refl	reflexive pronoun	1.5
adj, adv, noun	POS errors	4.0
<u>-io</u> , <u>-iu</u>	correlative pronoun	0.9
pl	plural	8.9
<u>sg</u>	singular	3.8
<u>akt</u> , pas	active vs. passive	1.1
<u>ata</u> , <u>ita</u>	aspect	1.1
<u>yfin</u> , as, is, os	finiteness/tense	4.9
us, u	finiteness/non-tense	0.9
inf	infinitive	1.3
<u>ig/iĝ</u> (affixes)	missing (in)transitivity	5.9
DEL: <u>ig/iĝ</u>	spurious (in)transitivity	3.4
ado, <u>ul</u>	other affixes	0.9
		99.9

Comma error types

Tag	Error	%
<u>FS-start</u>	start of subclause	64.5
<u>FS-end</u>	end of subclause	4.5
<u>FScO</u>	subclause coordination	2.8
<u>FMco</u>	main clause coordination	24.1
contrast	contrasting comma	2.1
comma	unspecified	0.5
no-comma	wrong/spurious comma	1.5
		100

- 2/3-plejmulto de subpropoziciaj startkomoj:
 - Subpropoziciojn oni plej ofte postmetas aŭ antaŭmetas
 - Tiun komon oni ne uzas en la angla lingvo